**Fabelo pri papilio**

Mi nun rakontos al vi historion kaj kredu al mi, tio ĉi vere okazis. Ĉar mi vidis ĉion per miaj propraj okuloj. Nu, fakte ne mi mem, sed amiko de kuzino de la edzo de mia fratino foje pasigis tutan tagon en tiu lando. Kaj oni ĉion al li rakontis detale. Kaj eĉ la papilion montris. Ne, ne la saman certe, sed tute similan.

Do, pri la papilio.

En unu malgranda lando kies nomo al vi nenion dirus regis iam juna reĝo. Kaj tiu reĝo revis pri glora batalo. Ne, li tute ne estis sangavida kaj kverelema reĝo. Sed li tre volis ke la posteuloj memoru lin kiel Konkerinton aŭ almenaŭ Nevenkeblan. Certe ege gravis ke tiun batalon li nepre venku. Aŭ kiu scias, kiun kromnomon inventus mokemaj posteuloj. Sed bedaŭrinde la reĝo tute ne certis pri siaj talentoj de ĉefkomandanto. Kelkaj korteganoj eĉ interflustradis ke la reĝo tro multe pensas. Nu, ankaŭ la popolo tiel opiniis, sed ĉar la reĝo estis bonkora kaj simpatia, oni amis lin kaj eĉ pli gravajn difektojn oni pardonas al tiu kiun oni amas.

Nu, mi ripetu, ege gravis por nia juna reĝo certi pri tio ke la batalo estu gajnota. Do li ordonis ke oni venigu en la kastelon diversajn saĝulojn kaj magiistojn - antaŭdiristojn, klarvidistojn, eĉ famaj sonĝemulojn.

Laŭvice solene eniradis ili la tronhalon kaj al ĉiu faris la reĝo nur unu demandon: "Kiel mi estu certa ke mi gajnos la batalon"? Ili ĉiuj komencis elokvente - laŭdante la reĝon, sin mem kaj siajn antaŭajn sukcesajn antaŭdirojn, recitante versaĵojn pri steloj kaj homaj destinoj. Poste ili balbutis pri kiom da kondiĉoj devas plenumiĝi, kiom da vojoj interplektiĝi, kaj tiam la reĝo nepre gajnos sian batalon, se, certe, Marso kaj Merkuro dum la ekvinokso….

La reĝo ĝentile aŭskultadis, donis al ĉiu po dek oraj moneroj kaj forpermesis ilin unu post la alia.

Sed poiomete li iĝis pli kaj pli malĝoja. Ĝis kiam unu saĝulo, ĝiba rufbarba maljunulo kun ruzaj okuletoj, diris: "Via Reĝa Moŝto, vi nepre gajnus iun ajn batalon tuj post kiam orflugila papilio sidiĝos sur vian nazon".

Tiom certe kaj simple li tion diris, ke la reĝo tuj reĝojiĝis, forpelis ĉiujn restantojn (ne sen donacoj, ĉar ili ja alvenis kaj provis helpi), sidiĝis apud malfermitan fenestron kaj ekatendis.

Fakte en tiu ĉi lando estis multege da papilioj, ĉiuspecaj kaj diverskoloraj. Sed orflugilaj papilioj estis la plej grandaj kaj la plej belaj el ĉiuj. La lando prave fieris pri tiu ĉi mirindaĵo kaj neniu turisto forlasis la ĉefurbon sen magneto aŭ breloko en formo de tiu papilio.

Do nia reĝo dum la tuta tago restis apud la fenestro, sed neniu orflugila papilio eĉ alproksimiĝis al li. La sekvan tagon li pasigis promenante en la ĝardeno. Kaj kvankam dekoj da papilioj sidiĝis sur lian kapon, manojn kaj certe la longan

reĝan nazon, neniu el ili estis orkolora.

Pliaj tagoj sekvis. Unue la reĝo malpacienciĝis, li kuradis post la papilioj kaj eĉ provis persvadi ilin honorigi lian nazon per sia vizito, proponante… Nu vere, kion oni povus proponi al papilio? Mi ne scias kaj ankaŭ la reĝo ne sciis, tamen li provis diversajn pli-malpli frenezajn ideojn. La lasta provo estis kiam li ordonis kapti kelkajn centojn da tiaj papilioj, meti ilin ĉiujn en ĉambreton kun malalta plafono kaj li enfermiĝis tie dum kelkaj tagoj, vane esperante ke finfine almenaŭ unu el tiuj insektaĉoj, almenaŭ por unu sekundo, tuŝos lian malfeliĉan nazon. Sed la papilioj estis ŝajne ne malpli obstinaj ol la reĝo mem.

Post iom da tempo tio ĉi tedis al la reĝo. Li rememoris pri sia reĝlando kaj okupiĝis pri aliaj, ne malpli gravaj aferoj. Nur unu kutimon de tiuj papili-tagoj li ne forlasis. Li ŝatis promeni sola tra ĝardenoj aŭ arbaroj kaj longe, senmove kaj silente sidi ie sub arboj.

"Li certe estas iomete freneza", - diradis la korteganoj. - "Ne decas al nobeluloj tiom multe pensi". Sed tio ja estis vera kalumnio. Ĉar la reĝo dum tiuj horoj fakte ne meditis, sed simple ĝuis sunajn radiojn sur la vizaĝo, freŝan venton, birdajn kantojn kaj eĉ dancojn de la papilioj - li antaŭlonge pardonis ilin. Ajnokaze, la reĝlando prosperis, ĉar adiaŭinte la militrevojn la reĝo ekinteresiĝis pri konstruado kaj terkultivado. Kaj se la reĝlando fartas bone, oni povas pardoni iom da frenezeco al la estro.

Pasis multaj jaroj kaj dum unu varma somera vespero la reĝo sidis en sia plej ŝatata loko en la ĝardeno. Sed ĉi-foje li sidis ne sole, apud li estis knabo kun same longa nazo, lia nepo. La duopo fiksrigardis ŝaktabulon. La juna princo ege progresis en la ludo, kaj nun ambaŭ entuziasme cerbumis. Subite la knabo ekridis: "Avĉjo, vi havas papilion sur via nazo!" La maljunulo tuŝis sian vizaĝon kaj jen, granda bela orkolora papilio jam estis forfluganta. La reĝo distre ekrigardis la ŝaktabulon - kaj tuj evidentiĝis al li per kiuj du movoj li nepre venkos. Li rigardis la nepon. Tiu mordis sian lipon okulumante la figurojn. La reĝo rigardis sian manon sur kiu restis kelkaj oraj polveroj kaj ridetinte faris malĝustan movon.

"Avĉjo", diris la feliĉa knabo post kvin minutoj, "Ĉu vi ne malĝojas ke vi malvenkis?" "Ni certe reludos" respondis la reĝo, "kaj sekvontfoje vi ne venkos tiel facile, ĉar mi intencas trejni min antaŭ nia sekva batalo. Kaj nun ni iru hejmen, la avino nin atendas por vespermanĝo”.

**Fabelo pri eliksiro**

Dika griza kato buliĝis sur la tablo kaj rigardis maljunan alkemiiston (vilaĝanoj nomas lin sorĉisto, sed tio ne plaĉas al li, do ankaŭ ni nomos lin laŭ lia prefero alkemiisto), do la alkemiisto metis ion en la retorton kaj ekskuis ĝin. Du paroj de okuloj - helbluaj kaj oranĝkoloraj atente observis la retorton dum kelkaj minutoj, sed verŝajne la rezulto ne estis bona, ĉar la maljunulo vespiris kaj forverŝis la enhavon en sitelon dum la kato kurbigis la dorson kaj komencis akrigi siajn ungojn kontraŭ la tablo.

Tio okazis dum malvarma vintra mateno en la subtegmento de kaduka dometo ĉe la rando de la vilaĝo. Tio tute ne estis malhela subtegmento kun vento libere promenanta trans fendoj kaj araneoj teksantaj siajn retojn sur malpuraj muroj. La malsovaĝigita vento ion senzorge kantadis en la kamentubo kaj kvankam unu eta araneo estis permesata loĝi en malnova kruĉo, la subtegmento aspektis gemuta kaj hela pro multaj surmuraj lanternetoj. Fajro kraketis en malgranda kameno kaj en fera forno. En kaldronego sur la forno boletis malhelblua likvaĵo. La alkemiisto prenis puran retorton.

- Ĉu nova provo? -  sarkasme demandis la kato. La alkemiisto kapjesis.

- Ĉu vi scias ke ĝi estos jam la okcent kvardek dua? - denove demandis la kato. - Kaj kion vi aldonos ĉi-foje?

- Ĉu vi kalkulas? - ekkoleris la maljunulo.

- Certe, - respondis la kato, - Mi ja bezonas ion fari dum vi okupiĝas pri tiu stultaĵo. Mi ne promesos ke mi ne laciĝos, do mi konsilas ke ankaŭ vi kalkulu.

- Mi havas novan ideon, - grumblis la alkemiisto.

- Ĉu vere? Kia novaĵo! - La kato larĝe oscedis. - Veku min kiam vi rememoros pri tagmanĝo.

Kaj ĝi malfermis siajn brilajn okulegojn.

Mi iomete klarigu, ĉu?

Iam vivis alkemiisto kiu… Ĝuste tiel mi devus komenci mian historion kaj rakonti ĉion laŭ ordo, sed la fabeloj samkiel iliaj herooj ne ĉiam estas obeemaj, do mi simple daŭrigu. Tiu alkemiisto kiel multaj aliaj dum sia juneco okupiĝis pri tute normalaj aferoj - transformo de metalo en oron, serĉo de la filozofa ŝtono kaj tiel plu. Sed tiujn puzlojn li baldaŭ solvis kaj ekenuis. Tiam li decidis ke li faru ion utilan. Komence li aŭdacis serĉi efikan kuracilon por ordinara malvarmumo. Sed dum sia esplorado, tute hazarde, en unu polvokovrita folianto li trovis manskribaĵon titolitan

*Recepto de la vivĝojo*. La alkemiisto tuj forgesis pri io alia.

Iuj ingrediencoj (ekzemple cinamo, citronmeliso, drakaj skvamoj aŭ sekigita floro de kakto) troviĝis en lia propra provizo aŭ estis tuj aĉetitaj en la plej proksima apoteko.

La aliaj, kiel sunaj briletoj en la kuranta akvo aŭ la unua kantado de juna najtingalo, troviĝis kun pli da penoj. Kaj kiel li akiris skatoleton de luna polvo, pri tio mi povus rakonti apartan historion. Sed finfine ĉio bezonata estis preta. Ĉio, krom unu.

Ĉar la recepto finiĝis per la vortoj “Kaj la lasta paŝo - aldonu unu ……..da varma ……” Kaj anstataŭ mankantaj literoj - la kato aparte ŝatas tiun pecon de la historio, ĉar tio klarigas kial ĝi mem trafis ĝin, - anstataŭ mankantaj literoj videblis spuretoj de akraj musaj dentoj. La kolera alkemiisto tuj forpelis ĉujn musojn de sia domo kaj neniu de la offenditaj bestetoj konsentis malkovri la sekreton de la manĝitaj vortoj. Mi pensas, neniu el ili fakte kapablis legi, sed forirante la musoj arogante silentis, do mi ne povas esti tute certa.

La alkemiisto tamen ne rezignis. Li ja studadis dum multaj jardekoj kaj konis milojn eblajn kaj neeblajn substancojn kaj elementojn. Ĉu li ne trovos unu? Li jam sciis ke tio almenaŭ povas esti mezurata kaj varmigata. Kaj li entuziasme komencis sian serĉadon.

Mi pensas ke nun ni povas reveni al la subtegmento. Ĉi-matene la alkemiisto denove provis aldoni al preskaŭ preta eliksiro kelkajn diversajn varmigitajn likvojn, mineralojn, pulvorigitajn plantojn, eĉ skribitan sur papereto la vorton “varmo” en ĉiuj konataj lingvoj - sen iu rezulto.

- Kien vi iras? Malvarmegas, - malfermetis unu okulon la kato.

- Mi nenion plu havas ĉi-tie, mi iros ien kaj eble ion trovos, - murmuris la alkemiisto, envolvante sin en la mantelon. - Mi irados kaj mi trovos aŭ…

- Aŭ malvarmiĝos ĝismorte pensante pri kion pli varmigi. Interalie, vi surmetis vian mantelon inverse.

- Ne gravas! - La alkemiisto frapfermis la pordon.

Li revenis jam krepuske. Ĵetinte planken la mantelon li komencis frotadi pufiĝintajn manojn apud la forno. Poste li longe senvorte staris tie rigardante la fajron.

- Mi teon por vi infuzis, - finfine rompis la silenton la kato kaj kapsignis al taso el kiu eliris vaporeto. - Trinku!

- Tiom da jaroj perditaj pro tiu absurdaĵo, kaj nun vi kun via stulta teaĉo! Iru vi ĉiuj ien for! - Li ekkaptis la tason kaj ĵetegis ĝin kontraŭ la muro.

Perplekse ektintis tassplitoj kaj la maljunulo, jam hontiĝinte volis diri ion pardonpetan, sed anstataŭe nur elspiris: Rigardu!

El la kaldrono malrapide leviĝis io, simila al pufa boliĝanta nubeto.

Ĉu eble guto da teo el transfluganta taso falis en la kaldronon? Sed jen, sub la plafono disvolviĝas io brilega, jam ne nubo sed malhelblua birdo kun arĝentkoloraj fajreroj sur plumoj de flugiloj.

Ĝi kelkfoje ĉirkaŭflugis la subtegmenton sidiĝis apud la fenestreto kaj ĵetis severan rigardon al la maljunulo.

- Jes, jes, certe, li haste malfermis la fenestron. La birdo klinis la kapon, kvazaŭ riverencis, kaj elflugis.

La alkemiisto kaj la kato subenkuris en la korton. Dum longa tempo ili rigardis kiel la birdo, apenaŭ videbla en la malhelo, ĉirkaŭflugis la vilaĝon kaj poste direktis sin al la urbo kies lumetoj flagris fore.

Ekneĝis. Grandaj blankaj flokoj malrapide falis en silento tiom solena ke ĝi kvazaŭ kantis.

- Ĉu ni iru hejmen? - finfine demandis la kato.

- Jes, malrapide respondis la alkemiisto, - Sed ĉu vi sentas ke ne plu malvarmas? Kaj kiel bela ĝi estas! Tamen mi iomete bedaŭras ke mi ne gustumis tiun eliksiron!

La kato etendis al li piedeton en kiu ĝi havis du malhelbluajn plumetojn.

- Dum vi gapadis kun la malfermita buŝo, - fiere diris ĝi.

La alkemiisto flaris la plumetojn. De proksime ili similis al herbspikoj kaj odoris je cinamo, citronmeliso, zingibro kaj varmo mem samtempe.

- Ĉu ni aldonu ilin al teo? - ridetis li.

- Nur ĉi-foje vi ĝin infuzu, -snufis la kato kaj alkuris al la domo, baraktante en la pura lanuga neĝo.

**Teo kaj ombroj**

Krepusko milde ĉirkaŭvolvis la urbon kvazaŭ pluŝa litkovrilo. La neĝo diamante brilis sub la lanternoj. Kien mi iras? - ekpensis ŝi, - Ĉio jam devas esti fermita.

Sed granda konstruaĵo fine de la strato afable rigardis ŝin per lumigitaj fenestroj. Ŝi longe vagadis laŭ koridoroj kaj ŝtuparoj sed finfine haltis antaŭ granda ligna pordo kun latuna numero 25.

- Devas esti ĉi-tie, flustris ŝi  kaj frapetis.

Sed la pordo jam malfermiĝis. Junulo kun larĝa rideto kaj frenezaj okuloj elsaltis brakumante malgrandan kartonan skatolon. La skatolo eligis strietojn de buntaj fajreroj. La knabo kure direktis sin al la lifto.

- Bonvolu atendi, sinjoro! Vi forgesis… El la ĉambro aperis alta maljuna oficistino en strikta malhelblua kostumo. Ŝi pene tenis grandan kaj evidente tre pezan grizan metalan keston. Sed la viro kun skatolo jam malaperis. La oficistino surplankigis la keston, frapetis ĝin kaj diris: - Nu, postkuru! La kesto ekmoviĝis kaj malrapide ekrampis laŭ la koridoro.

La grizhara oficistino turnis sin al ŝi: - Kaj vi, sinjorino?

- Ĉu numero dudek-kvin… Oni diris sube ke mi iru ĉi-tien… - kaj ŝi montris ĉifitan arĝentkoloran bileton.

La maljunulino favore kapjesis. - Bonvolu eniri kaj atendi, sinjorino! - kaj revenis al la ĉambro.

En la ĉambro jam staris alia viro - mezaĝa barbulo, malalta sed kun larĝaj ŝultroj. Li senhaste elpoŝigis similan bileton, zorge enpakitan en plastosaketon. Li metis ĝin sur la tablon kaj prenis el la manoj de la oficistino alian kartonan skatolon (ĉifoje ne estis multkoloroj fajreroj, nur varma mielflava lumo) kaj metalan kesteton, malgrandan kaj ŝajne multe malpli pezan. La viro delikate metis ambaŭ en sian dorsosakon, danke klinis la kapon kaj eliris.

- Kio estas en tiuj, grizaj? - nevole demandis ŝi.

- La revrealiĝo kunportas multe da aĵoj, - respondis la oficistino. Ŝanĝojn en la kutima vivordo, disreviĝojn, seniluziiĝojn. Eĉ ĝermojn de novaj deziroj. Ĉiu revo havas sian ombron.

- Sed kial…

- Ili malsimilas, ĉu? Tio dependas de kion oni vere volas kaj de la preteco ricevi ĝin. Sed nun pri vi. Kia estas via revo?

- Mi volas tason da teo.

- Ĉu? Vi ja posedas arĝentan bileton kiu garantias al vi realiĝon de iu ajn revo! Vi ne imagus kiom da homoj tiel longe ĉasis biletojn ke eĉ forgesis kion ili unue volis. Kaj vi ja volas ĝin ŝanĝi kontraŭ taso da teo?

- La revoj…. Mi havis tiom multe. Iuj realiĝis, sed tute ne tiel kiel mi imagis. La aliaj… mi pasigis bonan tempon revante ilin. Sed ĉio estas tiel implikita kaj konfuziga… Mi preskaŭ pri nenio plu certas.  Kaj ĝuste nun mi tre volas tason da bona varma teo. En kvieta komforta loko. Laŭ amika konversacio. Kaj senhaste, nepre senhaste, sed ĉiam mankas al mi tempo. Kaj mi ne plu havas amikojn. Ĉu vi nun vidas, ke ne tiom malmulte mi volas?

La oficistino silentis.

- Pardonu, mi parolas stultaĵojn. Vi ja okupiĝas ĉi tie pri gravaj aferoj. Mi foriru.

- Atendu. Mi konas tre bonan kafejon proksime. Mi jam finis laboron por hodiaŭ. Ĉu vi konsentos akompani min? Mi ne ŝatas trinki mian kafon sole. Teon oni

tie ankaŭ servas. Kaj ne malbonan.

La oficistino kliniĝis super la tablo kaj lanĉis programon en sia komputilo. - Ĝis via vekiĝo restas nur kvin minutoj, sed se ni iomete ĝustigu tempagordojn... Kaj vi ege eraras, sinjorino. Ne ekzistas malgravaj revoj.

**Fabelo pri fabeloj**

Noktiĝas. Ĉe malfermita fenestro sidas princino. Ŝi aŭskultas. Balan muzikon de la salono superbruadas voĉoj de promenantoj en la ĝardeno. Tute apude ekridas iu junulo. Dum unu momento ŝajnas al la princino ke ĝuste tiu ĉi rido estas la mankanta akordo sen kiu ĉiam sonis iomete false la melodio de ŝia vivo. La voĉoj malproksimiĝas. Nun estas aŭdebla nur milda flutmuziko. “Absurdaĵo!” - decidas la princino kaj pene leviĝinte malrapide iras al la lito. Ŝi haltas antaŭ la spegulo por kombi la harojn. Certe kuraĝa princino ŝi estas, ŝi ja ne ordonis forigi spegulojn de siaj ĉambroj. Tiktakas murhorloĝo. La princino senceremonie forŝovas de sia kuseno katon, same grizan kaj maljunan kiel ŝi mem, kuŝiĝas kaj trankvile ekdormas.

*La homo, kiu sidas sur la trunko de falinta arbo mallevis sian fluton kaj enpensiĝis. Distre li ekrigardis grandajn ŝtonojn apud la vojo. Tiu ĉi, kovrita per rufa musko, similas al kaŭriĝinta vulpo, ĉu ne? Kaj pri la nova kanto… ne, ĝi ankoraŭ ne plaĉas al li, ĉu li reprovu?*

La kavaliro rimarkas sub arbusto monujon kun oro kaj ledajn gantojn kaj haltas por levi ilin. La vojo estos longa, ĉio utilos. Li rutine forpiedbatas verdan koboldon kiu elsaltis el arbustaro kaj mordis lian suron. Poste la kavaliro denove surĉevaliĝas kaj rigardas apenaŭ videblan fore kastelon. Tie loĝas drako.
- Oni volas ke mi mortigu ĝin, - pensas la kavaliro. Ĉiam mortigu. Kial ne eblas paroli kun ĝi?

Eksonas vigla marŝo. La kavaliro prenas sian poŝtelefonon. - Jes, certe. Unu minuton. Li fermas la ludfenestron kaj malfermas la retpoŝtilon. Estas la dua kaj duono. Manĝopaŭzo finiĝis. Atendas lin laboro.

*“Ĉu malsukcese?” - moke demandis la ŝtona vulpo. La muzikisto kapjesis kaj malfermis sian trivitan dorsosako. “Jen ĝi estas!”, li eligis grandan antikvan poŝhorloĝon, malfermis la kovrilon kaj esplore rigardis la ciferplaton.*

La mondo estas malplena kaj laca. La ĉielo ruĝas pro la sango de la mortonta

suno. La drako sidas sur la pinto de  detruiĝanta monto. Juna kaj forta li estas. Kaj la drako scias ke antaŭ li estas longa, tre longa vivo. Longa kaj soleca, ĉar li estas La Lasta Drako. La juna drako rigardas maljunan mondon. Li aŭskultas la kanton de la vento. Li nenien hastas, la tempo ja ne mankas al li.

*“Denove ne funkcias”, - konkludis la vulpo. “Atendu!” - la homo longe turnadas montrilojn, fine trifoje forte skuas la horloĝon kaj denove streĉas ĝin.*

Sur sunvarmigita granda rulŝtono sidas knabino. Ŝi aŭskultas la mildan plaŭdadon de maraj ondoj kaj fingrumas buntajn ŝtonetojn kaj konketojn. Ŝi atendas.

“Rigardu kiun mi trovis!” ridante kuras al ŝi pene spiranta knabo. Enbrake li portas pezan dikan drakidon kiu mallerte svingas flugiletojn. Ĝiaj flavaj okuloj brilas kun ravo. Ludi! Ĝi tiel ŝatas ludi!  Plaŭdas la maro, ridas la infanoj.

*La homo  mallevis la fluton, ridetis kaj karesis la muskkovritan ŝtonan flankon. La vulpo leviĝis, malstreĉis krurojn, snufis kaj forkuris en la arbaron.*